Enfin, l'Association des journalistes de langue française vient de nommer à Genève un observateur indépendant chargé de veiller au respect des langues de travail dans les institutions internationales telles que l'ONU. Il ne s'agit pas de remplacer l'anglais par le français, mais de prendre en considération le rôle des langues dans la géopolitique mondiale. La «nostalgie de l'empire» dont la Francophonie peine à se détacher rappelle en effet que des rapports de force sont toujours en jeu.

En attendant que l'espéranto devienne la langue officielle des échanges internationaux, mieux vaut en effet cultiver le multilinguisme que le «globish» anglo-américain. Car à **langue unique, pensée unique**. Sans toutefois aller jusqu'à invoquer la «novlangue» imaginée par George Orwell dans son roman 1984, on n'hésitera pas à parler d'impérialisme culturel. Comme le soulignait Bernard Cassen dans *Le Monde diplomatique* (février 2008), «à la différence de la colonisation britannique, qui visait essentiellement les esprits des élites 'indigènes', l'américanisation, s'appuyant sur des marchés financiers et industriels devenus planétaires – ceux du divertissement en premier lieu –, et la volonté des Etats-Unis de sauvegarder à tout prix leur hégémonie géostratégique ont pour cible les esprits des masses».

Lorsqu'on évoque les causes multiples (historiques, politiques, économiques...) de l'essor de l'anglais, qui paraît inexorable aujourd'hui, la tentation est grande de jeter l'éponge ou de relativiser. Ce sont du moins les réactions observées par Daniel Favre: «En théorie, tout le monde est convaincu du bien-fondé de notre démarche. Mais lorsqu'il s'agit de passer à la pratique, il y a beaucoup plus de réticences, un manque d'implication. On nous répond que ce n'est pas une priorité, que ce n'est 'pas si grave'. C'est un combat permanent, avec des résultats souvent un peu aléatoires: il faut aimer se battre!»

Sans aucun doute, car les Don Quichotte du français ont du pain sur la planche.

MATHIEU LOEWER

... de Pékin ...

Soucieuses de préserver la "pureté" de la langue chinoise, les autorités ont interdit l'utilisation d'anglicismes ou d'abréviations en anglais dans les publications en mandarin.

中文

La "pureté" du mandarin est-elle menacée ? C'est en tout cas ce que pensent les législateurs chinois, qui viennent de prendre une nouvelle mesure pour protéger la langue nationale, *dénaturée*, selon eux, par l'utilisation courante de termes anglophones dans la presse. Selon

l'Administration générale de la presse et des publications, à l'origine de la loi, l'usage fréquent de mots anglais et d'abréviations dans les textes en mandarin ont créé de la confusion et représentent des "abus de langage". Selon une note de l'administration sur son site internet, de telles pratiques "ont sévèrement endommagé les standards et la pureté de la langue chinoise et perturbé le langage harmonieux et sain et l'environnement culturel, causant un impact social négatif".



Selon le *China Daily*, les publications seront donc désormais évaluées sur leur "usage standardisé des langues étrangères". Celles qui ne respecteront pas cette nouvelle loi seront punies.

[... / ...]

Y a-t-il une "crise du chinois" ?

Ce règlement intervient dans un contexte de préoccupation grandissante autour d'une supposée "crise du chinois", qui inclut également le problème d'oubli des caractères auquel sont confrontées les nouvelles générations, qui n'écrivent plus jamais à la main. Selon un sondage réalisé par le *China Youth Daily*, sur 3 269 personnes interrogées, 80% des Chinois pensent que leur langage est en crise. 52% d'entre eux estiment que la raison principale de cette crise est que "les Chinois font désormais plus attention à l'anglais qu'au chinois".

[... / ...]

« ... Hello, j'écrirai ce message en français pour être sûr d'être compris par nos compatriotes qui n'ont pas eu la chance de commencer l'anglais à 3 ans et ne sont hélas pas bilingues.

「110223」
 ともたにの果き番家ハJ次カ

「110223」
 ともたにの果き番家ハJ次カ



Nous nous félicitons bien sûr des récentes propositions de Luc Chatel et de M. Copé, la France avance enfin dans la bonne direction.



Hier, anglais en CE1 puis en CP, bientôt, espérons, à la maternelle, *It's good*, bravo, Mr Chatel ! Il ne nous

restera plus que quelques mesures courageuses à prendre pour que la France devienne un vrai pays anglophone, comme le sont le Danemark, l'Ouganda, le Rwanda depuis peu, l'Australie, la Nouvelle-Zélande, le Ghana et j'en passe !

Ces mesures sont :

- 1/ - lancer des quotidiens d'information en anglais : *The World, Today in France, The Team* ... remplaçant les quotidiens dans cette langue compliquée, rigide, passéiste qu'est le français
- 2/ - remplacer *France Télévision* par *France 24*, chaîne française pour l'international qui émet déjà en anglais. Les Français regardent beaucoup la télé, qui malheureusement leur parle en français. Il est temps que cela change. Pourquoi le JT est encore en français, cette langue coloniale sclérosée et inutile ? Cela ne suffit pas que certains films soient en anglais, sous-titrés en plus !! Tous les programmes doivent être en anglais. L'immersion, il n'y a que ça de vrai. Si les téléspectateurs ont le choix, ils risquent de rester sur les programmes en français, par paresse intellectuelle.
- 3/ - supprimer les allocations familiales pour les enfants qui sèchent les cours d'anglais
- 4/ - ... et également pour les parents qui continuent à vouloir parler français à leurs enfants, les idiots !
- 5/ - délocaliser les écoles françaises en Angleterre, en Irlande du Nord, au Liberia, au moins pendant quelques années
- 6/ - ... et surtout remplacer ces incapables de profs d'anglais français par de vrais profs anglais, born in the UK, des native speakers, quoi !!

Comment voulez-vous apprendre l'anglais avec un M. Lecas, un prof français qui passe son temps dans l'Hexagone ???

7/ - enfin et surtout, la langue officielle de la République doit devenir l'anglais. A quoi sert de conserver le français, cette langue inutile et compliquée, qui n'est plus parlée à l'étranger, qui est un fardeau pour nos enfants ? »

Don't forget to follow our blog: <http://agirpoulanglais.blogspot.com>

English speakers, be careful ! ...

Pour ceux qui suivent de près leur alimentation, voici les dernières recommandations en matière de nutrition et de santé.

On est soulagé de connaître enfin la vérité après tant d'études médicales contradictoires.

- 1. Les Japonais mangent très peu de graisses et ont moins de crises cardiaques que les Américains.
- 2. Les Mexicains mangent beaucoup de graisses et ont moins de crises cardiaques que les Américains.
- 3. Les Africains boivent très peu de vin rouge et ont moins de crises cardiaques que les Américains.
- 4. Les Italiens boivent énormément de vin rouge et ont moins de crises cardiaques que les Américains.
- 5. Les Allemands boivent de grandes quantités de bière, mangent de grandes quantités de saucisses et de graisses, et ont moins de crises cardiaques que les Américains.

Conclusion : Mangez et buvez ce que vous voudrez... C'est manifestement parler l'anglais qui tue !



AGENCE POUR L'EMPLOI


"Y a-t-il quelqu'un ici qui ait des connaissances en langues étrangères ?"

AGENTEJO POR LABOR-GESERĈANTOJ

"Ĉu iu ĉi-tie, posedas sciojn pri alilandaj lingvoj ?"

KALEJDOSKOPO

Nova aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto



Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto, libere uzebla ĉe la adreso <http://apertium.saluton.dk>

La tradukilo estas bazita sur *Apertium*, rimedaro por konstrui aŭtomatajn tradukilojn, per kiu jam funkcias tradukiloj el la kataluna, hispana kaj angla al Esperanto kaj de Esperanto al la angla. Ĉiujn eblas uzi ĉe la supra adreso. Entute per *Apertium* funkcias ĝis nun 42 tradukiloj.

Apertium estas programaro malfermfonta kaj libera, same uzanta liberajn datumarojn. Ekzemple, por ĉi tiu nova tradukilo el la franca al Esperanto estas ĉefe uzita kiel baza dulingva vortaro la *Reta Vortaro*, pro tio, ke ĝi estas libere uzebla kaj havas franclingvajn ekvivalenton preskaŭ por ĉiu vorto. La tutan fontokodon kaj lingvan datumaron de *Apertium* kaj de ties tradukiloj eblas elŝuti el

<http://sourceforge.net/projects/apertium>

Espereble tiu lanĉo ne nur liveros novan interesan rimedon, sed ankaŭ spronos pliajn homojn ekinteresiĝi pri la kreado de pliaj aŭtomataj tradukiloj aŭ la polurado de la jam ekzistantajn.


Unu el la atutoj de *Apertium* estas, ke ĝia strukturo permesas, ke nefakuloj pri komputila lingvistiko povas evoluigi tradukilojn, kiuj donas kontentigajn rezultojn. Krome, tio, ke *Apertium* estas malferma, universitate stirata projekto, permesas, ke studentoj evoluigantaj tradukilojn ricevu monhelpojn, ankaŭ se temas pri tradukiloj el kaj al Esperanto. Ekzemple jam du jarojn *Apertium* ricevis de *Guglo* po naŭ 5000-dolarajn stipendiojn por studentoj evoluigantaj novaĵojn dum la nord-hemisfera somero. Tiel kredeble denove okazos post nur kelkaj semajnoj. Ĉar esperantistoj bone situas interne de la *Apertium*-projekto kaj mem Esperanto estas bone konsiderata en ĝi, estas tute eble ricevi stipendion por krei en tri monatoj kernon de tradukilo inter Esperanto kaj (hindeŭropa) lingvo. Cetere, sinanoncintoj ja ricevos la helpon de la cetera Esperanto-grupeto en *Apertium*. Aliflanke, ne-studentoj estas ja ne malpli bonvenaj en la projekton.

Interesiĝantoj iel kontribui ne hezitu aliĝi al la retlisto http://groups.google.com/group/apertium_eo aŭ eventuale kontaktu *hectoralos* ĉe gmail.com

Fonto: *Ret-Info*

Hèctor Alòs i Font,
hectoralos@gmail.com

Unika ekspozicio pri desegnita humuro en Esperanto



Ĝis 3.6.2011 daŭras unika ekspozicio, prezentanta erojn el la bunta kaj ampleksa verkaro de la fama ĉeĥa desegnisto kaj karikaturisto *Pavel Rak*, kiu estas i.a. delonga aktiva esperantisto, kaj liaj desegnaĵoj estas konataj precipe el la gazeto *Juna Amiko* kaj diversaj libroj de *Stefan McGill*. Mallongaj komentarioj al la desegnaĵoj estas en la ĉeĥa, Esperanto, germana kaj la angla lingvoj.

La ekspozicio estas vizitebla en " Muzeo de Esperanto " en *Svitavy*, urbo situanta en mezo de Ĉeĥio, en ĉarma regiono de la t.n. Bohemia-moravia limlando. En la muzeo mem, situanta en belega historia vilao, videblas ankaŭ daŭra inform-ekspozicio en Esperanto, inkluzive informan tuŝ-panelon.

La urbo *Svitavy* kopatas precipe kiel naskiĝloko de *Oskar Schindler*, germano famiĝinta kiel savinto de judoj dum la dua mondmilito. Pri lia kontroversa personeco ni povas multon interesan malkovri en la ekspozicio en la urba muzeo. Sed la loko proponas ankaŭ aliajn allogaĵojn por siaj vizitantoj.

Pli vi povas informiĝi en la oficiala urba retejo www.svitavy.cz, kiu disponigas ankaŭ kompletajn informojn en Esperanto.

En *Svitavy* kaj pluraj proksimaj urbetoj aktivas E-klubo, kiuj volonte akceptos eksterlandajn gastojn por montri al ili sian regionon! La oficiala retejo de la muzeo kun ĉiuj bezonataj informoj estas

<http://www.muzeum.esperanto.cz>.

trabicikli la mondon ... horizontale !



Alice kaj Cedric estas du gejunuloj de *Chateauroux**, kiuj vojaĝis tra la mondo per "kuŝ-bicikloj" dum pli ol du jaroj. Ili iom post iom nutris ret-paĝojn per interesaj rakontoj kaj foto-serioj, dum la tuta vojaĝo.

Mi malkovris ilin tre malfrue, preskaŭ ĉe la fino de ilia vojaĝo. Mi decidis esperantigi ĉiujn notojn sub la fotoj en la rubriko "*komentoj*". Dum 7 monatoj, mi faris, kompreneble kun la konsento de la koncernatoj, tiun laboron, kiu estis tre longa, sed pasiiga kaj vere plezura.

Mi nun finis la tradukon, kaj tre varme konsilas al vi rigardi kaj informi viajn esperantajn amikojn, kiuj ne komprenas la francan lingvon.

Alice kaj Cedric ne nur enretigis tre belajn fotojn, sed ili ankaŭ interesiĝas pri la mondaj problemoj de (mal) respekto al naturo, kelkfoje ili montras homajn stultaĵojn kaj detruadon de la planedo, kelkfoje ili montras interesajn klopodojn de homoj por konservi la planedon pura kaj kultivi sen kemiaĵoj. Ni alterne sentas admiron,

fascinon al bela naturo, kaj koleron kontraŭ mistraktado de la naturaj resursoj. Alice kaj Cedric ankaŭ faris tre interesajn homajn renkontojn, la malplej gravaj ne estas la renkontoj kun esperantistoj, ĉar ili mem parolas esperanton. Ankaŭ humuro ne mankas en ilia raporto. Nek la baraktoj por ĉiutaga vivo kaj taŭga stato de la kuŝ-bicikloj.

Ilia retejo estas same valora kaj interesa, kiel tiu de *Cyrille kaj Roz*. Sed pli bone, ke vi mem rigardu kaj ĝuu :

www.everyoneweb.fr/portraitdeplanete

Alklaku la rubrikon "*photos*", komencu la rigardon je la dosiero "*Autriche...*", movu la fotojn alten por vidi la esperantan tradukon en la rubriko "*komentoj*", sube de la francaj frazoj.

Ne hezitu informi min, se vi ne povas vidi la esperantan tradukon. Eblas ke, en la futuro, la prezento estos iom ŝanĝita de Alice kaj Cedric, kaj la esperantaj frazoj pli facile atingeblaj.

**Chateauroux (ŝatoru) – FR 36000*

Ginette MARTIN
gimavo (ĉe) wanadoo.fr



Monda Socia Forumo en Dakaro

Ĉio iris tre bone, tre sukcese, tre glate.

*Mirejo***** havis konstante helpon de du, tri, kvar homoj: *Dejoris Alphonse Diatta, Fidel Bassene, Assane Faye kaj Antoine Gommis*. Ili bonege parolas nian lingvon, havas fortan motivigon, tre adekvate donis informojn al la vizitantoj de la stando, kaj tre lerte kaj trafe analizis la situacion de Eo en Senegalio.

Multaj kontaktoj ekis: Estis vizitantoj el la tuta mondo; tamen la plejmulto estis Senegalaj. Multaj gimnazianoj, studentoj, junaj personoj. Ĉiuj montris grandan intereson. Ĉiuj ricevis informilojn kaj klarigojn. Oni povas supozi, ke la landa asocio kreskos.

Mirejo povis paroli al politikistoj el Senegalio; al *Eva Joly*, franca deputito ĉe EU (filmis *Canal+*), parolis por pluraj radioj. Jam antaŭ la Forumo *Alphonse Diatta* povis fari elsendon pri Eo por radio "*Convergence FM*", kiu elsendas en tuta okcidenta Afriko. Li venigis la ĵurnaliston al la Eo stando; Mirejo faris duan elsendon pri Eo kun li. Poste li invitis ŝin en la elsendeja oficejo kaj ŝi faris elsendon pri Afriko ĝenerale, kun mencioj de Eo.

Substrekendas, ke informiloj estis senditaj al Mirejo antaŭ ŝia foriro el Meksiko, Germanio, Britio, Francio (UFE kaj SAT-amikaro), de privatuloj kaj finfine kompreneble de UEA. Entute proks. 15kg. Neniu informilo pri Eo vidiĝis sur la tero de la Forumo, homoj konservis ilin zorgeme.

Dum la Forumo estis eblo por la samideana skipeto multe interparoli. Nova etoso naskiĝis, tre pozitiva etoso. Ĉiu ricevis novan motivigon. Nova komitato elektiĝis dum rapide improvizita kunveno vendrede, konfirmota en baldaŭa Ĝenerala Kunveno de *Senegala Eo-Asocio*. SEA prepariĝas por verŝajna kresko!



Ciril kaj Roz' ĵus "retrovis" Eŭropon !



Lastminute ... la 9an de marto 2011, niaj du gesticiklantoj eniris Hispanion, post 29 785 kilometroj sur la "padoj" de la globo ! La granda aventuro preskaŭ finiĝis. Ili plenumis la de ili citaĵon...
"Privivu viajn revojn, ne prirevu vian vivon" !


Nia bulteno plurfoje publikigis erojn de iom freneza sport-defio, ĉerpante erojn el la regule senditaj, dulingvaj raportoj, majstre ilustritaj de fotoj kaj filmetoj.

Jen kelkaj linioj pri ilia restado en *Salvadoro* :

... Ili* instruas al ni la salvadoran kuirarton, ni, la francan. *Juan* estas tre klera kaj li eksplikas kio ŝanĝiĝis por la dudekdu jarlonga civila milito.

"La milito okazis precipe en la montaro, en la urboj videblis nenio. Post la milito iuj batalintoj fariĝis kontraŭleĝuloj aŭ anoj de krimaj teamoj, aliaj,

protektistoj de homoj kaj lokoj".




Ĉio estas protektita, vendejoj, publikaj kaj privataj lokoj, televidiloj en hoteloj estas ĉirkaŭataj de fera krado, ankaŭ la surstrataj telefonoj kaj la akvo-peliloj en publikaj necesejoj ! Ĉio ŝteblebla estas enkradigita...

Post tiom da perfortoj kaj da suferoj tio kompreneblas. Ni pensas je la eldiro de *Arturo Rivera Danas*, salvadoran episkopo :
"La fremdaj landoj, pro sia emo al tutmonda hegemonio, havigas armilojn... La salvadora popolo havigas mortemulojn !"

*temas pri *Juan* kaj *Patty*, kiuj afable gastigis la paron.

... / ...

Ni jam frandas anticipe baldaŭan legadon de iu *"memorlibro"*, kiun certe jam ellaborantas Ciril kaj Roz' !...

Le livre du mois - "flugi kun kakatuoj" de *Trevor Steele*

(Tiu recenzo kuŝas en « *Esperanto Aktiv* », monata letero de JEFO kaj UFE - marto 2011)

Au nord de l'Australie Occidentale, *Canterbury Downs* est un vaste et beau domaine pour les colons anglais qui en sont « légalement » propriétaires. En cette fin du dix-neuvième siècle, le jeune idéaliste *Billy Dixon*, très fier de sa bonne éducation britannique, sûr d'appartenir à la classe supérieure de la société, est heureux d'y travailler comme gardien des immenses troupeaux, « cow-boy » dirait-on sur un autre continent, après avoir abandonné l'idée de s'enrichir en devenant chercheur d'or. L'expérience avait été trop dure.

Mais autour s'étend un paradis, qui s'appelle *Ulganguhura* pour les *Banubi* dont les ancêtres ont vécu sur ces terres depuis des temps immémoriaux. *Elmanu*, leur chef, essaie avec les siens de chasser les Blancs. Les lances s'opposent aux fusils, la connaissance de la nature permet de ruser contre les cavaliers. La lutte est inégale. Le jeune *Jangabāra*, chassé par les siens pour n'avoir pas respecté les

totens, vient travailler sur le domaine. Il apprend les spécialités des Blancs : monter à cheval, utiliser un fusil, parler anglais. Billy se lie d'amitié avec lui.

D'un côté, le monde des policiers, dont certains ont le vieux titre de constables, et celui des éleveurs, de l'autre, celui des « nègres », tellement en harmonie avec la nature, les falaises, les grottes. Les cacatoès, symboles de pureté, de noblesse, attirent irrésistiblement *Jangabara*, si élané, si sportif, qui finira par les rejoindre.

Trevor Steele a écrit là un superbe roman sur son pays, et nous suivons les pensées et les actes, tantôt des Blancs, tantôt de ceux qui aiment vraiment cette terre pour elle-même.

Editeur : *Flandra Esperanto-Ligo* - 256 pages

NB (de la rédaction de « La Informilo ») – ouvrage disponible à la boutique d'Espéranto-France et au libro-servo de EFE.

« Mi profunde pensas, ke nia mondo estus pli bona, se multe da homoj lernus kaj utiligus Esperanton por pli bone komuniki. Mi simile pensas, ke se Esperantistoj strebus pli bone komuniki, nia afero antaŭeniĝos pli rapide.

Eble mi eraras, sed mi opinias, ke la Esperantistaro ne komunikas pli bone ol neesperantistoj. La ekstera informado dum jardekoj lamadas, kaj la interna interparolado inter Esperantistoj ne estas io pri kio ni povas vere fieri.

Mi ne estas fakulo pri interna komunikado, tamen mi intuicie pensas, ke granda parto de niaj miskomunikaĵoj devenas de la tro ofta NE-AUSKULTADO de aliaj homoj. La plejparto de la kandidatoj al *Komitato B* ne legas kaj respondas al demandoj dum la lastjara elektado. Estraranoj ege malofte sondas la opiniojn de sinceraj, lertaj Esperantistoj.

Ĉeestante multege da kunvenoj dum la UK-oj, mi konstatis, ke malofte parolantoj provas mencii la ideojn esprimitajn en antaŭaj

momentoj de tiuj kunvenoj. Ĉe forumoj kaj retdiskutejoj, ege malofte oni provas resumi la diraĵojn de aliaj homoj antaŭ ol vortigi opinion. En niaj retejoj ofte estas vortobataloj, ne vera, sincera komunikado.

Kvankam mi ne komprenas multe pri interna komunikado, mi fundamente kredas, ke bona, sana, frunktodona kulturo de iu asocio, de iu organizo, de iu firmao, dependas de la kvalito de la internaj komunikaĵoj. Bona komunikado helpas al ni atingi niajn celojn. Malbona bremsos nian agadon.

Mi pensas, ke estus bone krei kurson pri sukcesa, interhoma komunikado por membroj de asocioj. Tiaj kursoj ekzistas. Iu povas enretigi unu el ili. Ni povas studi, lerni kaj ekzameniĝi. Mi fieras esti Esperantisto. Mi fierus eĉ pli, se mi sciус tiom pri internacia, interhoma komunikado ».

Dennis Keefe

Universitato de Nankino, Ĉinio

... esperanto "por" sed ne "kontraŭ"...

« ... Pardonon, sed la ideo pri manifestacio "kontraŭ la angla" ŝajnas al mi ekstreme misa, absurda kaj danĝera por la bildo de Esperanto!!



Kompreneble, mi varme subtenas la partoprenon de esperantistoj en manifestacioj. Fakte, kune kun aliaj samideanoj, mi kelkfoje marŝis surstrate, plena je ĝojo kaj fiera pri mia esperantisteco, ekz. inter miloj da aliaj homoj, kiuj konvinkite pledis sub la slogano "alia mondo eblas" en *PortoAlegro, Brazilo*, en la inaŭgura marŝado de la *Monda Socia Forumo*.

Do, Esperanto kiel *PORA* (ne kontraŭa) movado, Esperanto kiel gaja komunumo de homoj, kiuj ĝuas la avantaĝojn de lingvo mirinde stimula, bela kaj praktika, Esperanto

kiel pozitiva strebado al pli racia kaj justa plenumo de bezono, Esperanto kiel integra parto de pli ĝenerala emo favora al pli libera kaj justa estonteco por ĉiuj, kiel ero de pli ampleksa movado por demokratio, kaj homaj rajtoj en la diversaj sferoj de la socia vivo.

NENIEL kiel iu reakcia, ekstremisma grupo de priridindaj marĝenuloj, kiuj grumblas pro tio, ke nuntempe multaj homoj uzas la anglan lingvon por plej diversaj uzokampoj. en kiuj ni vane insistas ke Esperanto funkcius pli bone ».

José Antonio Vergara

Ĉilia esperantisto, kuracisto, PUERTO MONTT, Ĉilio



« Karmen el Sevilla » ... en Esperanto?



Interkant' estas sendependa kultura Esperanto-asocio, kreita antaŭ du jaroj. Jam sukcese ĝi koncertis ses fojojn pri "Ĝenerala kanto", du aliaj koncertoj estas preparataj; la sekva prezento verŝajne okazos en Sarajevo dum la kongreso de SAT (30.7 ĝis 6.8.2011).

Por ke tiu kultura engaĝigo daŭru plu, kompetenta skipo preparas la duan projekton: "Karmen" - *ciganino el Sevilla*"

Eniris la skipon por Esperantigi ĝin: *Michel Duc Goninaz, Marcel Redoulez, Rikardo*



Cash, Bernard Legeay, Serge Sire. Konsilantoj: *Laurent Peuch* (teatraĵo), *Bernard Behra* kaj *Jorgos Comte*. Enscenigisto: momente serĉata.

Daŭro de la spektaklo: 2 horoj

La koncerto, preferinde, okazos en regionaj festsalonoj de 200/300 sidlokoj.

Sciu, ke la koruso *Interkant'* serĉas kantistojn, ĉefe tenorojn kaj infanojn. La proponata korusa laboro estas multe pli facila ol solista kantado, kaj kanteblas ankaŭ de simplaj kantistoj. Por prepariĝi individue eblas rete elŭti registraĵojn, ekzercadi hejme, kaj poste partopreni en regiona trimestra provludo. Estas atendata partopreno de belgoj, germanoj, svisoj, italoj kaj hispanoj kaj aliaj.

En 2012 kaj 2013 estos proponitaj *du staĝetoj de kvar tagoj*, en centro de Francio, por kunigi la diversajn aktorojn de la spektaklo.


Se vi estas organizanto de Esperanta renkontiĝo, pripensu enprogramigi nian spektaklon ekde la jaroj 2013/2014.

F. Leveque (korus-estrino),

leveque.franjo@gmail.com

3 rue Voltaire, FR-22000 – St Brieuc, Francio. Tel: +33 (0)9 53 927737

"Kantaro-vikio" nun havas pli ol 2000 kantotekstojn!



Ekde la jaro 2003, "kantaro-vikio" - alinome la "*libera kantaro*" - estas loko por ĉiu muzikema esperantisto, kie eblas trovi multegon da kantotekstoj, notoj, videoj kaj aliajn muzikaĵojn. Funkcia kiel vikio, ĝi ebligas komunan laboron de esperantistoj el diversaj mondopartoj.

En la komenco la *kantaro-vikio* havis nur kantotekstojn, sed la vivo ne staris unuloke, kaj nun krom tekstojn oni povas trovi ankaŭ muziknotojn, akordojn, tonsilabajn melodiojn, midi-dosierojn kaj ankaŭ spekti videojn.

En *kantaro-vikio* trovis sian duan vivon ankaŭ paperaj kantaroj. En speciala paĝo vi povas trovi liston de paperkantaroj kaj la kantotekstojn en ili.

Kiuj uzas *kantaro-vikion* ? Ho! Komencantoj, gvidantoj de kursoj, amatoraj ludantoj, mem aŭtoroj kaj muzikistoj kaj finfine ĉiuj muzikemuloj! Se vi antaŭe ne vizitis nian *vikion*, ne prokrastu, eble vi trovos ĉe ni delonge serĉatan amatan kanton!

Internacia teamo de kunlaborantoj, sen kies helpo nuna granda atingo ne eblus, invitas vin al kantaro-vikio jubilea!

Dankon al niaj viki-uzantoj, kiuj riĉigas nian kantaroson dum longa tempo, dankon al ĉiuj aŭtoroj, kiuj permesis publikigi siajn verkojn tie, dankon al ĉiuj retumanoj, kiujn tajpis eĉ unu literon tie, dankon al vizitantoj, kiuj serĉadas kaj trovadas kantojn tie.

Grandan dankon! - Kaj nun venu, vidu, kunkantu! - Adreso de la libera kantaro: <http://kantaro.ikso.net/>

laŭ [cirkulero n-ro 4 de *kantaro-vikio*]

ndlr: Iniciatinto, ĉefa laboranto kaj multjara motoro de la projekto estas

Ljoŝa Kuznecov, ka2pink@gmail.com, el Rusio. -

Multajn kaj sincerajn dankojn al li !



Esperanto-muziko ĉe *Radio Vinilkosmo*

Ĉu vi ŝatas Esperantan muzikon? Ĉu vi volas aŭskulti kantojn el la novaj Esperantlingvaj sondiskojoj? - Tiam aŭskultu do ofte la programon de *Radio Vinilkosmo* ! - kiu estas ĝuebla ekde decembro kiel subkanalo de *Esperanto-TV* ĉe:

<http://esperanto-tv.com/vinilkosmo>

Ret-radio el *Varsovio*

Kiel sciante, la 31-an de januaro estis ĉesigita la Esperantaj elsendoj de la pola ŝtata radio. Esperantlingvaj sonraportoj el Pollando tamen ne malaperis, ja krom la podkasto de Varsovia Vento aperis eĉ nova son-programo, lanĉita por la fejsbuka grupo "*Amikaro de Pola Radio en Esperanto, APRE*" - danke

al la persista laboro de *Barbara Pietrzak* kaj ŝiaj helpantoj. Feliĉe tiu interreta podkasto estas aŭskultebla kaj elŝutebla de iu ajn ĉe la adreso: <http://retradio.posterous.com>

Voĉoj el *Japanio*

Je 11.01.2011 estis lanĉita la 1-a elsendo de nova podkasto: "*Voĉo el Japanio*", pli-malpli semajne kompilita, kaj prizorgita de *Salih Zakirov*. La podkasto okupiĝas ne nur pri japaniaj politikaj kaj movadaj eventoj, sed ankaŭ pri kelkaj Esperantaj lingvaj aferoj. La "*voĉo el Japanio*" estas aŭskultebla ĉe :

<http://vej.posterous.com>

Listo de ĉiuj Esperantaj radioj/podkasto

Ĉu vi povus listigi ĉiujn Esperantajn radioelsendojn kaj podkastojn? Ĉu vi povus diri ilian konkretajn retajn adresojn? - Danke al la aŭtomatigeblo, programadaj ebloj de interretaj servoj, lastatempe aperis eĉ du retejoj, kiuj ne nur listigas la unuopajn songazetojn, ne nur aŭtomate aldonas al sia listo la freŝe aperantajn novajn numerojn de Esperantaj songazetoj, sed danke al la aŭtomatigebla prilaboro de RSS-fluoj, ili montras eĉ la enhavon de tiuj lastaj numeroj. Ne plu do oni povas argumenti kontraŭ la ne-aŭskultado, ke oni ne memoras aŭ ne scias la retajn adresojn de la unuopaj son-materialoj :-)

Jen adreso de la radio/podkasto-kolektoj:

- <http://www.esperanto-tv.com/radio> - projekto de *Aaron Irvine*

- <http://podkastaro.org> - aranĝita de *Wilfred Hughes*

Ligilo al unuigita podkasto de Esperanto-elsendoj:

- <http://www.rssmix.com/u/1822869/rss.xml>

Bonan aŭskultadon!

Szilvási László

... la kalumeto ?...

En la numero 575/576 de *Le Monde de l'Espéranto*, oni parolas pri diversaj revuoj, i.a. pri "*La Kalumeto*". Se vi volas plukonatiĝi kun ĝi, jen informoj:



Kiel ni aŭskultas? Kio estas "vera" indiano? Ĉu Esperanto ekstereŭropiĝas? Kio okazas kiam vira monto trovas inan monton? Al kio oni ofertas jadajn korojn? Kial la patrino de la suno ploris?

Tiom da demandoj! Ĉu vi deziras ekscii la respondojn? Se jes, petu senpagan sendon, retan aŭ paperan, de la aktuala numero de "*La Kalumeto*," la kvaronjara bulteno de *Projekto Indiĝenaj Popoloj*.

Se vi ĝis nun ne petis la bultenon, bonvole donu vian retadreson kiel parto de via mesaĝo.

Erik FELKER

eifelker@dslextreme.com

(tuta intervjuo legebla en *la balta ondo*)

Martin Schäffer : « Pli multe da homoj en la mondo lernu kaj uzu Esperanton ».

Je la Zamenhofa Tago, la 15an de decembro 2010, per subskribo de la fondodokumentoj en Esperanto-renkontiĝo en la meksika urbo Querétar estis starigita la fondaĵo *Esperanto Internacia*. La ĉefiniciatoro de la nova fondaĵo, 48-jara diplomito en publika administrado, Martin Schäffer, aktivas por Esperanto ekde 1983 ĉefe sur la kampoj informado, gazetara laboro, financoj kaj administrado. Ekde 2006 li estas ĝenerala sekretario de Germana Esperanto-Asocio kaj reprezenta la asocion en la komitato de UEA. Li membras en la estraro de la FAME-fondaĵo kaj estas prezidanto de la fondaĵo *Mondo*, kiun li mem fondis. Ekde 2006 li loĝas en Meksiko kaj laboras ankaŭ por la tiea movado kaj por la Latinamerika. Li afable konsentis respondi niajn demandojn.



" AlterTour de France " avec une participation internationale espérantiste ?



Herman Deceuninck, Belgique, attire l'attention sur la possibilité, pour les cyclistes espérantophones, de participation à l'Altertour de France 2011, c'est-à-dire au *Tour de France alternatif*.

En outre, sur le site www.bikechina.org l'espérantophone chinois *Hans Ngo*, de Chengdu, membre de *Sichuan Esperanto-Asocio*, a exprimé son intention de participer avec son amie étasunienne *Bobbi Fisher*, à la course de longue distance "*Paris-Brest-Paris 2011*" pour '*ultrabikers*', c'est-à-dire 1200 km aller-retour. Si Hans Ngo parvient à se préparer, il sera le premier cycliste chinois — et espérantiste ! — à participer à cet événement sportif.

Des photos de Ngo apparaissent sur le site Ultrabiking Chengdu dont il existe une version en partie en espéranto (drapeau vert, à gauche). Herman suggère que Hans et son amie Bobbi puissent participer aussi à l'Altertour 2011, ce qui, du point de vue médiatique, apporterait évidemment beaucoup à l'espéranto.

Georges Brassens en Esperanto, (de)nove



Post elĉerpiĝo de la unua albumeto de kantoj de *Georges Brassens*, kantitaj en Esperanto de *Jacques Yvart*, "*Vinilkosmo*" kaj Yvart decidis reeldoni ĝin kun aldono de sep pliaj kantoj, kaj proponi novan albumon kun kantoj reregistritaj, remiksitaj kaj remastrigitaj. La albumo *Brassens plu* aperos je Pasko 2011 okaze de IREM: Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo.

En IREM Jacques Yvart donos spektaklon en Esperanto pri Georges Brassens ĝuste en *Sète*, la urbo de Brassens, en la koncertejo *Georges Brassens*, kaj en la jubilea jaro de la naskiĝo kaj forpaso de Brassens... Tiu spektaklo estos grava evento por la urbo, kaj la nova albumo estos la ĉerizo sur la torto!



Finiĝis la Abon-periodo 2010

La abon-periodo 2010 jam finiĝis per la lasta numero 152. Ĉi-tiu numero 153 jam estas la unua de la jaro 2011. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 154 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2011.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2012 - 2013

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2011. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

Jaroj:		2011	2012	2013
Abono por adresoj en Francio:		14 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:		18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:		7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj		20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG	• Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.		
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jaroj, membro en TEJO kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago).		
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Esperanto</i>		
		10 eŭroj	24 eŭroj	60 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2011 por 1027			
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2011, 2012 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.			
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)			
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)			
		Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo Estas kolekto de tre interesaj rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio La libro estas tre bele ilustrita de Susumu Saga kaj tradukita de Judyta Szczerbicka Yamato		Afrankite 26 eŭroj
		Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bildvortarojn riĉe kolor-ilustritajn. La poŝforma eldonaĵo (A6) bone povas servi kiel poŝlibreto al kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbocelaj donacoj kaj propagandiloj.		Afrankite 6,50 eŭroj



El nia libroservo



Nove alvenintaj libroj



1



2



3



4

1) **Esperanto : lingvo-literaturo-movad** Esperantologio, Pierre Jeanton, U.E.A. (1988), 120 paĝoj, 6,00 €. Faka priskribo de la lingvo, de ĝia literaturo kaj de la esperanto-movado.

2) **Amo kaj morto en Balio**, Tradukita romano, Vicki Baum, U.E.A. (1986), 420 p, 6,00 €, "sociolo fascina romano pri la tradicia vivo sur la indonezia insulo Balio"

3) **Kiuj semas plorante**, Romano, Eva Tófalvi et Odrfič Knichal, U.E.A. (1984), 108 p, 4,80 €. "kvazaŭ taglibro de homo, kiu erarvas sub influo de faŝisma ideologio".

4) **Kontralte**, Poezio, Marjorie Boulton, Stafeto (1955), 288 p, 9,00 €. Poemoj en pluraj ĉapitroj : trista tenereco, unu virina koro, la ora branĉo, bestoj kaj sezonoj, fenestro al la mondo, personoj, el verda notlibro.

Resumoj, recenzoj, opinioj...



Verdeskaj Pensoj Georgo HANDZLIK, KLEKS, 136 p, 6,00 € Originalaj esperantaj aforismoj
La tutan libron mi englutis senhalte !!! Fakte mi ne devintus, ĉar temas pri aforismoj ! Nu, aforismo ĝenerale ne postulas longan pripensadon ! Ĝi tuj perkutas ! Kvankam, se oni ne deziras supraĵi, ankaŭ ili malkaŝas al ni multon ! Sekve tiu libreto 133-paĝa taŭgas kaj por homoj vorantaj librojn grandkvante, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj deziras nur rapidan, momentan ĝuon ! La de mi malkovrita reklamo por tiu libro de Georgo HANDZLIK tutsimple prezentis kelkajn ekzemplojn de aforismoj verdeskaj elpensitaj de diversaj famkonataj esperantistoj . Jen do ankaŭ por vi kelkaj eldiraĵoj ! En la libro vi retrovos multajn konatulojn - se vi konas la movadon ! Jen do ilia vid- aŭ ridpunkto, kiel diris Raymond SCHWARZ, nia samregionano : Tra densa mallumo briletas la celo - Ĉiuj lingvoj estus multe pli facilaj, se ne estus poetoj - Homoj ne bezonas precizan helplingvon, por multaj sufiĉas la angla ! Ktp ...
E.L.

Por mendi librojn :

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉisuban mendilon)
 - per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H.NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-
S-ro/ino
-
-

En

la

Subskribo:

... ni prouu  rideti !...

Estontaj pilotoj staĝumas. Ili ricevas lastajn informojn de la instruanto :
« *Daŭre primemoru ĉi-tiun gravan principon de aernavigado : ekflugo restas eventuala ... sed alteriĝo estas deviga !* ».



En publika ĝardeno, iu viro ripozas sur benko, lulante bebveturileton en kiu seninterrompe krias infaneto.

Iu preterirantino aŭdas la patron, kiu kviete, duonlaŭte ripetas :
« *Kvietiĝu Johano, kvietiĝu, restu serena Johano ...* ».

Ŝi alproksimiĝas kaj alparolas la viron :
« *Bonege ! Raras la patroj, kiuj tiel kondutas kun siaj idetoj, bonege !... Nu, tiu bela bebo nomiĝas Johano ?*
- *Tute ne, li nomiĝas Petro ... Mi estas Johano !* ».

☆☆☆

Iu malliberulo scias, ke la Direktoro de la karcerulo legas ĉiujn senditajn aŭ ricevitajn leterojn.

Iumatene, atingas lin mesaĝo de sia edzino kun simpla demando :
« *Kiam mi devas planti poreojn ?... Jam doloras al mi la dorso, pensante al tiu tasko !* ».

Li tuj respondas :
« *Grave, ne fosu en la ĝardeno ! Tie mi enterigis la biletojn de la ŝtelo !* »

Unu semajnon poste, letero de la edzino tekstas :
« *Imagu ! Tuta ŝkipo da policistoj invadis la ĝardenon kaj zorge kaj profunde trapugis la areon senrezulte !* ».

Senprokraste li redaktas respondon :
« *Bone, nun ci povas planti la poreojn cia dorso ne doloras !* ».

La Direktoro de malsanulejo trafas en koridoro, kurantan, duonnudan viron ...
« *Hej, kio okazas ? Mi bone memoras, ke vi devas esti operaciita ĉi-matene ! Kial vi forlasas la fak-ĉambron ?*

- *Ĉar mi aŭdis admonon de unu el la helpantaj flegistinoj ... Estu kuraĝa, ne tremu, ĉio bone disvolviĝos !*
- *Nu, ŝi bonintence deziris kvietiĝi vin !*
- *Tute ne, la kirurgiston ŝi alparolis !* ».

☆☆☆

La patrino eniras la dormoĉambron de sia filo :

« *Ludoviko, ellitiĝu ! Estas jam la oka !*
- *Lasu min dormi mi petas, panjo mia, ege laca mi estas, kaj plue ...*
- *Ludoviko, mia karuleto, ellitiĝu ! Vi riskas alveni malfrue en la liceon !*
- *Sed la liceon mi absolute ne plu deziras viziti, panjo mia ... Tien mi rifuzas iri !*
- *Ludoviko, karuleto mia, tiel vi ne devas konduki ! Ne forgesu, ke vi estas la liceestro !* ».



Neatentema biciklanto faligas piediranton... Li haltas kaj helpas la malfeliĉulon restariĝi...

« *Bonŝancon vi vere havas !*
- *Nu, tion vi aŭdacas diri ?*
- *Memevidente... Kutime mi stiras veturilon !* ».

Episkopo pretas trairi la straton, post severa pluvego, kiam subite veturilo ŝprucmakulas la robon de la sub-eminenco !

Tion rimarkis la stiranto, kiu haltigas sian aŭtomobilon iom pli proksime, kaj iras al la gravulo por peti senkulpigon.

Tiam la episkopo alparolas piediranton sur la trotuaro :
« *Hej, vi ... kiu rajtas elbuŝigi profanajn vortojn, ĉu vi konsentus helpi min, dediĉante al tiu pekanto la adekvatajn riproĉojn ?* ».



Du ebriaj viroj ĵus forlasas la drinkejon. Subite unu kliniĝas kaj forprenas pecon de frakasita spegulo... Li okulumas al la ekranon kaj eldiras :

« *Ŝajnas, ke mi konas tiun vizaĝon !*
- *Montru !* ».

La alia siavice rigardas la vizaĝon, kiu reflektiĝas kaj konkludas :
« *Kompreneble ! Temas pri mi !* ».

☆☆☆

Junulo vizitas la familion de sia amatino, dezirante elvoki estontan edziĝon...

La patro, kiu ne aprezas la petanton, abrupte argumentas :

« *Eksciu, junulo aŭdacca, ke mi ne edukis mian filinon dum tiom da jaroj, por ke ŝi daŭre vivu apud stultulo !*

- *Nu, tute prave, estimata sinjoro... Ĝuste pro tio mi proponas igi ŝin mian edzinon !* ».

... ĉarmaj infanoj ! ...

Frostas dum januaro ... En tiu et-infanlernejo, iom antaŭ la matena paŭzo, la deĵoranta instruistino reagis favore al peto de knabeto, bezonante helpi cele surmeton de siaj botoj, kiuj ja rifuzas akcepti la etajn piedojn. Ŝi surgenuiĝas, kaj post puŝo, tiro, puŝado kaj tirado, jen la afero solvita !

Tiam, la knabo :

" *Doloras miaj piedoj, Fraŭlino, la botoj devas esti inverse surmetitaj !* ".

La Fraŭlino, kiu ĵus restariĝis, surgenuiĝas denove, komencas ŝviti, kiam ŝi konstatas, ke pravas la etulo.

Nu, nova manumado por forigi la botojn, sed ŝi konservas sian serenecon ĝis la fina plenumo de la laboro. Je tiu momento eldiras simplanime la knabeto :

" *Ne temas pri miaj botoj...* ".

La Fraŭlino, kiu intertempe restariĝis, bremsas ekmovon de sia mano, mordas siajn lipojn, turniĝas sur si mem kaj iĝas nerveze scivolema ... Kial do la etulo ne avertis ŝin komence ? La aludita etulo vidas, ke li ĉagrenis sian Fraŭlinon kaj prefere silentas...

" *Bone, ni do forigu ilin !* " La dua piedo preskaŭ aperas, kiam daŭrigas la knabeto :

" *Ne temas pri miaj botoj, ili apartenas al mia frato, sed panjo diras, ke mi devas surmeti ilin ...* ".

La instruistino, kiu pretas ekplori, retenas tamen siajn larmojn, reforigas kaj resurmetas la du botojn. Ŝi restariĝas, certagrade fiera, ĉar fine sukcesis la tasko !

Ŝi plue helpas la knabeton surmeti la mantelon, volvas lian koltukon kaj informiĝas ...

" *Kie estas ciaj gantoj ?*

- *Por ne perdi ilin, en la botojn ilin mi ŝovis ...* ".






1 – ŝmilblik

Jen ĉi-sube citaĵo de *Jean-Henri FABRE* (1823-1915), franca entomologo, humaniso, verkisto kaj poeto.

Bedaŭrinde, ĉiu litero de la esperanto-alfabeto iĝis alia dum la tajpado... Ekzemple, ĉiuj r iĝis g.

« ... E j p l e l h m , e j j g h m p m g h l b l b g j f k u o j e a o j d
r j g l o n f b e m g m n m l f , o l m r j g l h j a n u o j e a o m f k n o
j u j e e j v a f k n p l e m ».

2 - krukvortenigmo



HORIZONTALALE

1. Tiu, kiu penas malkovri ion nekonatan.
2. Parto de aŭtomobilo.
3. Teatra prezentaj'.
4. Tio, pri kio estas parolate. Ni komencu! Meze de ŝipo.
5. Temanta pri amo.
6. Antikva roma moner'. Hirundo-simila bird'.
7. Ĉilia haven'.
8. INVERSE: Ekzistanta en iu tempo. Grasa likv'.
9. Organ', kiu aŭtomate interrompas elektra cirkvito. Numeralo.
10. Ilo por soldato. Malgrand'.
11. Vasal', kiu respektate honoras iun.
12. Regnokodo de Kanado. Herb' tre parenca al drabo.
13. Ekzistas. Ekkrio esprimanta senzorgecon
14. Ag' de aĉeti ion. Encefal'.
15. Hejtoform'.
16. Koncept'. Onomatope' simila al ŝafbleko . Partikulo.
17. Eŭropa urbo.
18. Loko. Fosanta reptili' el Saharo.

VERTIKALE

1. Ag' kontraŭa la komuna saĝo. Herb' kun plume dividaj folioj, kiel milfolia.
2. Subtera komunikilo uzata dum milito. Seka frukt' de frakseno. Tagdekoj.
3. Aplike forton sur ion. Likvo elfluanta el okulo. Dio edukanto de Dioniso.
4. Difinita part' de spaco. Indikato en aŭtomobilo.
5. Kuracmetod'. Kakatu'. INVERSE: Modere trinkant'.
6. Aviadila aparat'. Jur'.
7. Internacia respondkupon'. Mont' apud Trojo. Densa ar' de haroj sur kapo. INVERSE: Fabela estaj'. INVERSE: Amatino de Zeŭso.
8. Sedimenta petr'. Aparato. Vendej'.
9. Fonemo. Unuo de interstela distanco. Vito el NE Usono.

Solvoj de la lastaj enigmoj (152)

1/ vertikala enigmo - *politeknikistoj scias ĉion, sed nenion alian*

2/ krukvortenigmo

Horiz.: 1.MIKRONEZI. 2.AS. ARE. AT. 3.SKARLATIN. 4.TILA. NERI. 5.OHADI. 6.ULM. VEST. 7.MALFORTAJ. 8.ICAR. NE. 9.SEMINARI. 10.TR. KOLOSO. 11.ITNAK. 12.NU. STOMAK. 13.LA. ODAR. 14.FONEMAR. 15.ABEL. OL. 16.EKLEZIANO. 17.KRON. STEK. 18.SEJ. SKOLO.

Vertik.: 1.MASTRUMISTIN. FLEKS. 2.ISKI. LACERTULO. KRE. 3.ALOMLAM. ANALOJ. 4.RARAH. FRIKAS. EBEN. 5.ORL. AVO. NOKTOMEZ. 6.NEANDERTAL. ODALISK. 7.TEIST. ROSMAR. ATO. 8.ZAIR. TANIS. ONEL. 9.ITINT. JE. ORK. BLOKO.

... el nia fototeko ...



Roberto kelnerumas dum la ĜA-paŭzo - Hiroshimo, ekspozicio de ricevitaj mesaĝoj el la tuta mondo, okaze de la tago de la virino - Cyrille kaj Roz' en Malezio - En alia lando, Cedric kaj Alice penas sur sablopado ! - Ili ĉeestis la prelego pri interpretado (paĝo 1 !)